

Johann Wolfgang von Goethe,  
 Kanto de la spiritoj super  
 la akvoj

*tradukita de Karl Jost*

La homa animo  
 similas al akvo,  
 de l' ĉielo ĝi venas,  
 al ĉielo ĝi iras,  
 kaj devas denove  
 reveni al tero,  
 daŭre ŝangante.

Torente de l' alta  
 kruta rokvando  
 pura la akvo  
 ĉarme dis̄sprucas  
 je nubondoj  
 sur glatan rokon,  
 kaj facilkviete  
 fluas nubvuale,  
 murmure  
 en la profundon.

Se staras rifoj  
 al falo kontraŭe,  
 ĝi ŝaŭmas kolere,  
 ŝtup-al-ŝtupe  
 abismen.

Nun malrapide  
 ĝi trarampas la valon,  
 kaj en glata la lag'  
 respegulas sin.  
 ĉiuj la astroj.

Vent' estas al ondo  
 ĉarma kunulo;  
 vent' kirlas el fundo  
 ŝaŭmantajn ondegojn.

Animo de l' homo,  
 vi similas al akvo!  
 Sorto de l' homo,  
 al vent' similas ja vi.

Johann Wolfgang von Goethe,  
 Gesang der Geister über den Was-  
 sern

Des Menschen Seele  
 Gleicht dem Wasser:  
 Vom Himmel kommt es,  
 Zum Himmel steigt es,  
 Und wieder nieder  
 Zur Erde muß es,  
 Ewig wechselnd.

Strömt von der hohen,  
 Steilen Felswand  
 Der reine Strahl,  
 Dann stäubt er lieblich  
 In Wolkenwellen  
 Zum glatten Fels,  
 Und leicht empfangen,  
 Wallt er verschleiernd,  
 Leisrauschend  
 Zur Tiefe nieder.

Ragen Klippen  
 Dem Sturz entgegen,  
 Schäumt er unmutig  
 Stufenweise  
 Zum Abgrund.

Im flachen Bette  
 Schleicht er das Wiesental hin,  
 Und in dem glatten See  
 Weiden ihr Antlitz  
 Alle Gestirne.

Wind ist der Welle  
 Lieblicher Buhler;  
 Wind mischt vom Grund aus  
 Schäumende Wogen.

Seele des Menschen,  
 Wie gleichst du dem Wasser!  
 Schicksal des Menschen,  
 Wie gleichst du dem Wind!

...

...

*Traduko de la Germana poemo “Gesang der Geister über den Wassern” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de KARL JOST (\*1876 – †1952).*

*Arg-504-989 (2010-01-11 12:54:14)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en la revuo “Heroldo de Esperanto”, n-ro 9 (1144), 27-a jarkolekto, de l' 1-a de junio 1951. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.literaturo.dk/spiritoj.htm>. S-ro Lars Kromann (Stenbrydervej 6, Værløse, DK-4640 Fakse, Danio, [lars.kromann@mail.dk](mailto:lars.kromann@mail.dk)) enmetis ĝin tien. Karl Jost estis tre aktiva Esperantisto loginta en la svisa urbo Zuriko. Li estis kunkondinto de la Zurika Esperanto-Societo kaj verkis multajn tradukojn, lerno-libron de Esperanto kaj aliajn Esperantajojn. Vidu ankaŭ la retejon [www.planlingvoj.ch](http://www.planlingvoj.ch)*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22).*

*Arg-504-988 (2010-01-10 17:18:40)*